Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

**La 2-a Virtuala Kongreso de Esperanto • 17 – 24 julio**

# La Kolombo de Paco

**26-a de julio 2021, numero 15**

Redaktas Dmitrij Ŝevĉenko kaj Anna Striganova

## Gratulojn okaze de La Esperanto-Tago!


Elŝutu kaj disvastigu afiŝojn en via lingvo: https://mallonge.net/e7




## La Unua Libro

La Unua Libro aperis la 26-an de julio 1887. Inter esperantistoj, tiu ĉi dato estas festata kiel la **naskiĝtago de Esperanto**.

Ni invitas vin rememori la daton per la vizito de la Vikipedia paĝo, dediĉita al la libro: https://eo.wikipedia.org/wiki/Unua_Libro



ДР̲Ъ ЭСПЕРАНТО.

МЕЖДУНАРОДНЫЙ ЯЗЫКЪ.

ПРЕДИСЛОВІЕ

и

ПОЛНЫЙ УЧЕБНИКЪ.

por Rus,o,j

Чтобы языкъ былъ всемірнымъ, не достаточно назвать его таковымъ.

Цѣна 15 копѣекъ.

ВАРШАВА.

Типо-Литографія Х. Кельтера, ул. Новолипье № 11.

1887.

**Kara Kongresanoj! La 2-a Virtuala Kongreso de Esperanto oficiale finiĝis, sed daŭre eblas spekti ĉiujn Spektaĵojn, kiujn oni maltrafis, aŭ re-spekti tiujn, kiujn oni ŝatis: https://vk.retevent.com/programo?t=talks**

**Se vi ne aliĝis kaj volas havi aliron, eblas plu aliĝi per https://vk.esperanto.net.**

# 14 elstaraj agantoj diplomitaj dum la 2-a Virtuala Kongreso de Esperanto

En la Fermo de la 2-a Virtuala Kongreso de Esperanto (VK) estis anoncitaj 14 ricevantoj de la Diplomoj pri Elstara Agado aŭ pri Elstara Arta Agado, aljuĝataj de la Estraro de UEA ekde la jaro 2007.


## Diplomo pri Elstara Agado:

**Petro Baláž, Dorota Rodzianko kaj la teamo de E@I (Slovakio)** pro la elstara agado en organizado de aranĝoj kaj projektoj, inter ili KAEST (ekde 2010), SES, SEP, Poliglota Kunveno (ekde 2017), mallonge.net, kaj pro la teknika realigo de diversaj Esperanto-eventoj dum la pandemio, inter ili la Monda Festivalo de Esperanto, VK de UEA, IJK (2020) de TEJO kaj VEKI de ILEI;




**Marija Belošević (Kroatio)** pro la elstara agado kiel organizanto, ekde 2013, de la Tagoj de Lernado dum la Universala Kongreso kaj, en 2020 kaj en 2021, dum la VK;

**Elysée Byelongo (Sud-Afriko)** pro la elstara agado kiel unua afrika esperantisto, kies doktoriĝa tezo havas sekcion pri Esperanto, kaj kiel kreinto de E-kluboj en Najrobio, Zimbabvo kaj Tanzanio, inter ili la Klubo de Paco kaj Frateco, kadre de kiu li instruis la lingvon al centoj da rifuĝintoj en la Tendaro Nyarugusu, inter 1996 kaj 1998;





**Eva Fitzelová kaj Johannes Mueller (Germanio)** pro la elstara agado kiel kreintoj kaj prizorgantoj de la podkasto kern.punkto.info;






**Irana Esperanto-Asocio (IrEA)** pro la elstara agado kiel organizanto kaj gastiganto de multaj retaj eventoj, aparte ekde la komenco de la pandemio, inter ili la 7-a Irana Esperanto-Kongreso (IREK), la unua virtuala kongreso en Esperantujo, en aprilo 2020, kaj la kursaro Tibor Sekelj;


**Kolombia Esperanto-Ligo (KEL)** pro la elstara agado pri la reta instruado de lingvoj dum la pandemio, inter ili la kursoj pri latinidaj lingvoj per Esperanto kaj du furoraj eldonoj de la Esperanto-kurso por hispanparolantoj, en 2020 kaj 2021, kun sume pli ol 1000 aliĝintoj;

Irana Esperanto-Asocio انجمن اسپرانتوی ایران

**Luis Obando (Kolombio)** pro la elstara agado interalie kiel reviviginto kaj prizorganto de la jutuba kanalo UEAviva (youtube.com/UEAviva) kaj de la voĉlegita versio de la revuoj Esperanto kaj Monato;

**Rafael Lima (Brazilo)** pro la elstara agado kiel kreinto kaj prizorganto de la retejo de UEA UN Esperante (unesperante.wordpress.com) kaj ĝiaj profiloj en sociaj retoj;





**Suzuki Keiichiro (Japanio)** pro la elstara agado kiel plenuminto de 4 periodoj kiel prezidanto de Japana Esperanto-Instituto (JEI), dum 8 jaroj kaj okaze de la 100-jara jubileo de JEI;

**Wu Guojiang (Ĉinio)** pro la longtempa elstara agado kiel gvidinto de la projekto Ĝemelaj Urboj kaj gvidanto de la Liaoning-a Esperanto-kultura Klubo (LEKK).





## Diplomo pri Elstara Arta Agado:

**Amir Naor (Israelo)**, plurfoje premiita en la Belartaj Konkursoj de UEA, pro la elstara kontribuo al la E-kulturo kiel verkisto, tradukisto de literaturo kaj kantoj kaj kiel kreinto kaj kunordiganto de la retejo verkoj.com;

**Anna Striganova (Rusio)** pro la elstara kontribuo al la E-kulturo kiel eldonisto, ilustristo, fabel-verkisto (mallonge.net/striganova), pup-faristo kaj fotisto, interalie pro la lastatempa malavara donaco de multaj el siaj fotoj al Vikimedio;






**Eterne Rima (Pollando/Japanio)** pro la elstara kontribuo al la muzika E-kulturo kiel pioniro de la esperantista hiphopa kaj repa muziko;

**Paulo Sérgio Viana (Brazilo)**, plurfoje premiita en la Belartaj Konkursoj, pro la elstara kontribuo al la E-kulturo kiel tradukisto, eldonisto, recenzisto kaj kontribuanto de Beletra Almanako kaj Esperanta Retradio.





# Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo dum la 2-a VK

Kiel reprezentantoj de la Esperanto-Centro Herzberg en Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo ankaŭ ni esperis je ĉeesto en la UK en 2021, sed pro la pandemiaj reguloj ni devis akcepti la limigojn je virtuala kunestado, kunfestado. Tamen, per la perretaj prelegoj ni povis prezentiĝi ĉe la Movada Foiro, kie ni rakontis pri la kreskanta Esperanto-biblioteko de nia Centro kaj



donis enrigardon en niajn kolektaĵojn, kaj krome raportis pri la vastaj agadoj de la Esperanto-Centro en Herzberg kaj en la regiono. Ni dankas al ĉiuj interesiĝantoj, subtenantoj la atenton, amikajn rimarkojn, kunpensadon, ktp., kiun ni spertis dum tiuj prezentadoj. Vasta internacia partoprenantaro sekvis ankaŭ niajn du ĉefprelegojn: 1) pri Interkultura Centro Herzberg, kiu estas krom biblioteko, arkivo ankaŭ klubejo, kursejo, klerigejo, organizejo kaj kulturcentro, kaj 2) pri Herzberg am Harz, kiu ĵus festis sian 15-jaran jubileon post



la decido de la urba aŭtoritato en 2006 pri la ekuzo de la kromnomo "la Esperanto-urbo". Estis agrable kunfesti kun pluraj dekoj da aŭskultantoj, rememori eventojn, rerigardi, resumi rezultojn de tiu 15-jara senlaca agado por "verdigi" la urbon kaj dividi kun geamikoj niajn pensojn, planojn pri estontaj realigendaĵoj.

Kiuj maltrafis la virtualan prezentadon de nia Esperanto-Centro, estas bonvenaj starigi demandojn, kontakti nin per letero, retmesaĝo, telefono, kaj eĉ baldaŭ viziti nin en Herzberg! Koran bonvenon!

Gratulojn al la organizantoj de VK pro la bona laboro, dankon pro la fona helpo por sukcesigi prezentadojn.

*Kun multaj amikaj salutoj,*
*Petro kaj Zsófia*

# Asocio Nova Familio

Dum la 2-a VK okazis prezento pri la Asocio Nova Familio (ANF), Goma, DR Kongo, kiu prizorgas georfojn, kiuj perdis siajn gepatrojn pro la regionaj intercivitanaj militoj (jam pli ol 20 jarojn). ANF dum la lasta jaro multe laboris, sed sukcesis sendi nur 110 de la 205 prizorgataj georfoj (kun paŭzoj) al la lernejo. La asocio tamen sanig(ig)is plurajn infanojn, helpis lukti kontraŭ la kronviruso (disdonis maskojn, lavabojn kaj sapojn) kaj post la erupcio de la vulkano Nyiragongo (majo 2021) disdonis vestaĵojn kaj manĝaĵojn. ANF daŭre instruas al la infanoj Esperanton, kiun ili tre ŝatas, ĉar ĝi donas al ili esperon en la mizero.




Nun ANF serĉas geonklajn klubojn, grupojn kaj privatulojn, kiuj sekurigos tutjare la lernejajn kotizon kaj materialon por 1, 2, 3… infanoj, ĉar la gastgepatroj ne povas pagi tion. Pagendas jaroe por infano po 150,-€ (baza lernejo), 240,-€ (mezlernejo), 520,-€ (universitato).

Por helpi iĝu onkl/in/o kaj „adoptu" unu (aŭ plurajn) infano(j)n kaj donacu monon regule al tiu(j) – aŭ unu foje al ĉiuj. Pludonu la informojn al multaj aliaj homoj kiuj povas donaci monon. Koran dankon! Informoj je https://mallonge.net/g9 kaj https://mallonge.net/ga.

Eblas sendi monon pere de PayPal al cifrank@t-online.de aŭ per germana bankkonto (kontakto: orfojkongo@gmail.com) filmetoj en jutubo: https://mallonge.net/5v



# Dankon, Zamenhof! (kanto)

"Dankon, Zamenhof!" estas kanto verkita de la brazila poetino Nazaré Laroca, kantata de la brazila esperantisto Dirce Sales. La videon kreis Glória Sol en 2017. La kanto estis verkita en 2012 kaj prezentita dum la Nacia Vespero de la 97-a Universala Kongreso de Esperanto (UK) de 2012 en Hanojo kiel karnavala marŝeto kaj nun donacita al UEAviva kiel danko-simbolo pro la okazigo de la 2-a Virtuala Kongreso de Esperanto en 2021 post nuligo de la 106-a UK. Dankon, Nazaré, Dirce kaj Glória! Kaj dankon, Zamenhof! ;)




La kanto spekteblas ĉe UEAviva: https://mallonge.net/g6

Subtenu la laboron de UEA per membriĝo: https://uea.org/alighoj/alighilo

# Esploro pri stilo kaj esprimoj en Esperanto

Esplorista grupo, gvidata de Mireille Grosjean, lanĉis enketon cele al esploro de la stilo kaj esprimoj en Esperanto en priskribo de iu realaĵo.

La esploristoj deziras vidi, kiom grandaj estas la diferencoj en la priskriboj, kiom influas la stilon la origino de la priskribinto.

Legu pli ĉe la paĝo: https://edukado.net/novajhoj?id=856